

Espero

Katolika

REVUO MONATA EN ESPERANTO

RELIGIO. — FILOZOFIO. — HISTORIO. — SOCIOLOGIO
LITERATURO. — ARTO

REVUO DE REVUOJ. — BIOBLOGRAFIO. — ŜAKOJ

« Unum ovile et unus pastor » (Joh. X, 16.) « Unu ŝafaro kaj unu paŝtanta ».

ABONEJOJ de E. K.

FRANCLANDO { Ĉe la Direktoro de E. K.
Ĉe la Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, PARIS V^e
Ĉe librojo Warnier kaj K^o, 46, rue Sainte-Anne, PARIS.

ANGLOLANDO : S-o O Connor, 17, St-Stephen's Square, Bayswater, LONDON.

BELGLANDO : S-o P. Mattelaer, Woorstraat, 50, COURTRAI.

BOHEMUJO-AŬSTRIO F. Topič. libr. Ferdinandova 9. PRAHA.

ĈILILANDO S-o Luis E. Sepulveda Cuadra, Casilla 1679. SANTIAGO-CHILI

HUNGARLANDO S-o Endre Varju IV, Kigyo, U. 62. em. 14, BUDAPESTO

ITALLANDO : S-o Jakobo Bianchini, S. QUIRINO DE PORDENONE (*Udine*)

HISPANLANDO : S-o Ant. Guinart, Escuelas Pias. VALENCIA.

GERMANLANDO Moller et Borel, 95, Prinzenstr. BERLIN.

POLUJO Arct. libr. Nowy Swiat, 53, WARSZAWIA.

RUSLANDO Societo Espero, Bol. Podjačeskaja, 24, log. 12. S. PETERBURGO

SVISLANDO Librojo Garin, 20, rue Corraterie, GENEVO.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

Ĉe la Direktoro : P-o Em. PELTIER

Sainte-Radegonde ; Tours (Indre-et-Loire) France

Manuskriptoj kaj leteroj pri E. K. estu sendataj nur
al la Direktoro. — Manuskriptoj neniam estos resendataj

Ciuj verkistoj estas persone respondaj pri siaj artikoloj. La Revuo estas responde nur pri artikoloj subskribitaj de la Direktoro. — E. K. estas malfermata por ĉiuj personoj kaj por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj).

KONDIĈOJ DE ABONO

bono jara : $\left. \begin{array}{l} \text{En Franclando: 4 frankoj.} \\ \text{Ekster — 5 fr.} \end{array} \right| \text{Unu numero: } 0 \text{ fr. 50, afrankite}$

Abonoj estas akceptataj nur por tuta jaro. Komencaj datoj: oktobro, januaro au marto. La Revuo ne aperas en agosto nek en septembro. Postmarkoj estas akceptataj por efektiva valoro.

Anoncoj. — Tuta paĝo kostos 40 frankojn; — duona paĝo — 2 fr.; — 4^a paĝo: 15 fr.; — 8^a paĝo 9 fr.; — 16^a paĝo: 5 fr. Por anoncoj ripetitaj, rabatoj:

Por ancnci en E. K., sin turni al S-o G. Warnier, 46, rue Sainte-Anne, Paris.

MUZIKAĴOJ DE S-INO GUIVY

Ho Mia Kor', poezio de D-ro Zamenhof.....	1 fr.
En Sonĝo poezio de D-ro Zamenhof.....	1 fr. 6 ^t
Birdoj, Forflugu, poezio el <i>Flandra Literaturo</i>	1 fr. 60
La du Muloj, fablo de La Fontaine.....	1 fr. 60
Himno, poezio de P-o A. Dombrovski....	1 fr. 25

PLENA KOLEKTO DE ESPERO KATOLIKA.

(1-a j., — 2-a j., kaj 5 n-oj de la 3-a jaro).

Ĉiu jaro: 2 fr. (dek kajeroj da 8 paĝ.)

Duono de la 3-a jaro (ĝis marto 1906) 1 fr.

(La tuta kolekto ĝis marto 1906 5 fr. afrankite). **Artikolo legindaj en la kolekto:** Fremduloj (E. Peltier). Spiritoj larĝaj (E. Peltier). Greka skismo (V. E.). Sidi-Lakdar kaj lia lernanto (A. Thill). Objektiva kriterio de poezio (A. Dombrovski). Animo en malliberejo (Prof. Louis Arnould). François Coppée skizo; ekstraktoj (E. Peltier). Ŝaklecioj por lernantoj. Diversaj artikoloj literaturaj, lingvaj; kaj informoj pri la I-a Kongreso Esperantista, ktp. ktp.

BIBLIOTEKO DE E. K.

Kato kun botoj (luksa eldono, 6 ilustr.).....	0 fr. 50
Cindrulino (sama kolekto, 6 ilustr.).....	0 fr. 50
(La du verkoj kune mandat'j 0 fr. 75)	
La Katolikaj Esperantistoj ĉe la II ^a Kongreso de Esperanto en Genevo (1906). Plena raporto, kun la prediko de P-o Em. Peltier.....	0 fr. 15
Esperanto?... Qu'est-ce?... Franca broŝur. propaĝ....	0 fr. 10

ESPERO KATOLIKA

(HONORATA PER APOSTOLA BENO DE PIO X-a, 27-an DE JUN. 1906)

ENHAVO

Kelkaj Klarigoj (Em. PELTIER).....	65
La Edukada demando en Anglujo (G. Kean kaj C. SLATER) <i>Sekvo</i>	66
Malfermita letero al la Pastroj (V. LAŠNJUKOV).....	69
Letero el Germanujo (K. ZACHERL).....	71
Kongreso de la Germanaj katolikoj (F. VOGEL).....	71
Kanto malĝoja (Dr. REM).....	78
Unua komuniĝo de juna Apostolo (P. C.).....	79
La lasta Abencerĝo (Fleda kaj VINKO).....	82
I.a Puno (Luis CARLOS).....	88
Ŝakoj. — Pensoj.....	94

KELKAJ KLARIĜOJ

La legantaro de E. K. konstatis, de kelkaj monatoj, malfruon en la apero de la Revuo, kaj plendis al la Direktoro; aliaj ne plendis *skribe*, sed kredeble plendis *enkore*... Klariĝoj estas do necesaj.

Mi ofte diris, en E. K., ke mi devas zorgi pri ĝi *ekster miaj profesiaj devoj*. Mi ne estas escepto: preskaŭ ĉiuj batalantoj de Esperanto sammaniere agas. Sed tiuj, kiuj konas min, kiuj vidis min ĉe la kongresoj, scias ke mi ne estas korpe « fortulo »! Okazis do, ke la laboro ĉiam pligrandiĝis, de tri jaroj, kaj ke samtempe miaj fortoj *ne pligrandiĝis*... ĉe kontraŭe *etiĝis*!

Depost la lasta kongreso mi estis ĉiam malbone fartanta. De l'komenco de decembro, mi estis tute malsana. Mi iom resaniĝis fine de decembro, kaj tial povis fini la verkadon de E. K. novembra. Poste mi denove *re-malsaniĝis* kaj estas ankoraŭ tre malforta.

Ŝajnas do, ke tiu stato ne povos daŭrigi tre longe: aŭ mi devos min dediĉi plene al *Espero Katolika* kaj al la disvastigo de Esperanto inter katolikoj, — kaj tio estas mia plej ega deziro; aŭ mi devos tute forlasi E. K. kaj Esperanto'n, por plenumi miajn profesiajn devojn.

En sama okazo, tre konata kaj sindonema pioniro de Esperanto, elektis la duan vojon, por savi sian vivon.

Se vi sendos mem vian abonpagon, vi gajnos 0 fr. 50.

Kion do mi faros ? Mi ĝis nun nescias . Tio dependas de vi, karaj legantoj.

Se mi povos *vivi* sole per *Espero Katolika* ; si mi povos forlasi la oficon de profesoro, mi elektos la *unuan* vojon.

Por tio estas necese, ke ni duobligu l'abonantaron kaj mi liveras al vi rimedon, sur la flava folieto enmetita en tiu ĉi numero de E. K.

Se mi ne povos vivi per E. K. pro la nesufiĉa nombro de abonantoj; tial mi devos forlasi E. K., kaj tio estos por mi fortega ĉagreno, kaj kruela frapo al mia koro.

Mi konfide esperas, ke la legantaro de E.K. kiu formas fratan aron, eĉ familion, energie klopodos por **DUOBLIGI L'ABONANTARON.**

Em. PELTIER:

Direktoro de E. K.

P.S. — Pro la malsano de la Direktoro la *Propaganda Kroniko*, la *Universala Komunikilo*, la *Bibliografio* kaj la *Notetoj* ne troviĝas en tiu ĉi numero.

Ankaŭ mi komencis artikolon pri la Religia persekuto en Franclando. La malsano haltigis min. Tial mi petas, ke oni senkulpigu mian nevolan silenton pri tiuj gravaj aferoj.

LA EDUKADA DEMANDO EN ANGLUJO

Parto II^a (1)

La enkonduko en Parlamenton de la Bilo de Sro Birell, Ministro de Edukado, estis signalo, kiu kolektigis la klopodemana mikaron de la Memstaraj (Voluntary) Lernejoj de Regno. Laŭ la aŭtoroj de la Bilo, la du ĉefaj principoj estis : « Populara kontrolado, Forigo de Religiaj Provoj. » Por efektivigi la unuan la lokaj konsilantaroj de la tuta lando ricevis la povon kontroli, laŭ siaj deziroj, la tutan Memstaran Lernejaron. Kvankam tiuj ĉi estis konstruitaj per privataj entrepreno kaj mono, la konsilantaro povus nomi geinstruistojn tute sen religiaj ecoj por ia lernejo en sia propra distriktaro, tial nekatoliko kaj nonkonformisto aŭ eĉ senfidulo, *Agnostika*) povus ricevi oficon por ins-

Vidu E. K. novembro (n-o 32).

Pro pagigo per poŝto aŭ banko, ni devas aldoni 0 fr. 50 al la abonprezo.

truadi en katolikaj Lernejoj aŭ en la Lernejoj de la ŝtata Eklezio, kvankam tiuj lernejoj estis konstruitaj post granda memorferado por la difinita intenco instruadi la principojn de la respektivaj Denominacioj, al kiuj ili apartenis. Kelkaj facilecoj estas permesataj, en la Birrell'a Bilo, por la denominacia instruado, antaŭe donita en tia lernejo : oni povos doni religian, instruadon du fojojn ĉiusemajne ; kaj treegaj facilecoj en tiuj lernejoj, kie kvar kvinonoj de la gepatroj voĉdonantaj balote ĝin demandas, (4 fojojn ĉiusemajne). Sed tiaj facilecoj estis tiel malhelpataj per « kondiĉoj, » ke ili fariĝas praktike senutilaj. Oni ne povus fari uzon el ili en distriktoj kie la loĝantaro estas malpli ol 5.000. La lokaj aŭtoritatoj *ne estis devigataj* permesi ĝin. Kie permesataj, la loka aŭtoritato (konsilantara Edukeca komitato) *ne devas pagi* por tia instruado; oni ne devigos la geinstruistojn instrui ĝin kaj la gelernantoj ne estus devigataj ĉeesti ĉe ĝi.

Laŭ la subtenantoj de la Memstaraj Lernejoj, la Bilo estis konsiderata ne nur tute malkonvena, sed tiel maljusta kaj malprava, ke oni ne povus pensi pri ĝi kiel serioza bazo por la solvo de la religia demando. « Mi ne povas vidi eĉ unu savantan artikolon en ĝi, diris Dro Cassartelli, Episkopo de Salford ; ŝajnas al mi ke ĝi estas praktike konfiskado de niaj lernejoj. » Dro Riddelt, Episkopo de Northampton diris : « Se tiu ĉi malbonega propono fariĝos leĝo, ĝi elmontros, ke la Libereco vere forlasis la landon kaj Ŝtata Tiraneco anstataŭigis ĝin sur ĝia trono. Se ni submetiĝus al ĝi, ni agadus rolon de sklavo »

Oni do komencis organizi grandegajn kunvenojn tra la tuta lando. Tiaj grandegaj kunvenoj kun procesioj k. c., okazis ĉe Newcastle, Leeds, Manchester, London ; ankaŭ en preskaŭ ĉiuj paroĥoj okazis kunvenoj kaj ĉie la proponita leĝo estis forte denunciata. Ĉiuj aliaj demandoj fariĝis malpli gravaj ol la rajto instruadi la Katolikan Fidon en la lernejoj konstruitaj per Katolika Mono kaj difinitaj por ĝuadi rajton per garantioj donitaj de diversaj registaroj dum periodo da 30 jaroj. Ĉe la grandega procesio al Albert Hall, en kiu okazis memorinda kunvenego,

La 4-a jaro komenciĝis en oktobro ; ĉu vi abonis de oktobro ?

la Estro de la Irlanda (Politika) Partio, ros J. Redmond marŝadis flanko ĉe flanko kun la fama politika kontraŭulo de la celoj de la Irlanda Popolo, Grafo de Norfolk, Estro de la Anglaj Katolikoj, tiele elmontrante ke kiaj ajn politikaj diferencoj povas ekzisti inter la Anglaj kaj la Irlandaj Katolikoj, ili, tamen, estis perfekte unuigitaj por kontraŭstari la atakon al la Katolikaj Lernejoj de sia lando.

Unu el la plej impresigaj, — se ne la plej impresiga amasego da popoloj katolikaj el ĉiuj — okazis la 13^{an} de oktobro -06^a ĉe Belle Vue Zoologia Ĝardenego, Manchester, sub la aŭspicioj de la Katolika Federacio. Estis tago vere memorinda en la historio de la Angla Katolikaro. Viroj kaj virinoj venis milope el diversaj lokoj de Lancashire (Provinco Nord-Angluja). Oni kalkulis la nombron de la ĉeestintoj je 60.000 ĝis 70.000 da popoloj. La amasego disiĝis en 3 grandegajn kunvenojn kaj diversaj parolistoj faris paroladojn de tri estradoj. La paroladoj kaj decidoj, kvankam konsideritaj kiel militemaj, estis vere moderemaj kaj toleremaj. La Katolikoj estis kunigitaj amasege ne por ataki, sed por sin defendi. Tamen, forta parolo iris antaŭen. nome, ke se Katolikaj Principoj estus malrespektataj venus baraktado akrema kaj daŭriganta, kaj batalo ĝis la venko.

Unu parolinto diris : « Ni havas ankoraŭ nenian intencon fordoni la kontrolon de nia lernejaroj en la manojn de iu, kaj ni starigas tiun ĉi fundamentan principon : — t-e. la kontrolo, okupado kaj eĉ la tuta atmosfero de nia lernejaroj devos resti katolika nun kaj por ĉiam. Ni ankaŭ kunveniĝis hodiaŭ por diri al la Labora Partio Okupiĝu pri viaj propraj aferoj. Ne trudu vin en la aferojn de aliuloj. Pagu tiujn, kiuj ne povas trovi laboron kaj zorgu pri la malriĉeguloj ; sed ne devigu nin fari tion, kion ni tute ne deziras fari. Ni rediru ĝin : — Vi, Membroj de la Labora Partio, zorgadu pri viaj propraj aferoj aŭ baldaŭ tiaj Membroj ne troviĝos ie. » Tiuj ĉi kunvenegoj forte influis sur la registaro, kaj diversaj cedaĵoj estis permesataj. Kiam ĝi estis preta, la Bilo estis transportata el la Komuna Parlamento en la Grafaran. Tie ĉi ĝi estis rapide ali-formigita, tiom, ke la Ministraro deklariis, ke ĝi estis ŝanĝita

Mi ahonts diri, ke kelkaj ne ankoraŭ pagis por la 3-a jaro.

en alian Bilo entute. Je la resendo de la Bilo kune kun la Gra-faj ŝanĝaĵoj en la komunuma Parlamento por plua konsiderado — la ŝanĝaĵoj estis elĵetataj « are » kaj ankoraŭ unufoje la Bilon ili sendis al la Grafoj. La Registaro, tamen, sciigis sian intencon fari pluajn gravajn cedaĵojn favorajn al la Memstaraj Lernejoj, se la Grafoj konsentus al kompromiso; kaj tiuj cedaĵoj estis tiel favoraj, ke la Irlanda Partio, klopodanta por la Katolikoj, estus akceptinta ilin; sed la Grafaro tute rifuzis konsenti, kaj la 19^{an} de dec., la Ministraro malbonvole eligis la Bilon kun la minaco, ke neniam denove la Registaro favorus la Memstarajn Lernejojn kiel ĝi estus favorinta ilin, se la Bilo fariĝis Leĝo kune kun la ŝanĝaĵoj proponitaj en ĝi dum la lastaj tagoj de ĝia ekzistado. — La Bilo ja malaperis estas venko!

Verkita de P-o GODRIK KEAN, St Vincent's,
Openshaw. Anglujo.

Tradukis C. SLATER (el sama loko).

FINO.

MALFERMITA LETERO AL LA PASTROJ

de l'Rusa Eklezio.

Laika juĝistaro plenumis sian taskon kaj kondamnis min, kiel redaktoron de religia-societa gazeto *Kapods-Narod* (*Popolo*), esti enŝlosota en fortikaĵo dum unu jaro.

Nun mi deziras alian juĝon, tiun juĝon, kiu sola povis, kiu sola devis min juĝi, kiel religian predikiston.

Mi soifas kaj atendas juĝon de nia Eklezio.

Kian ajn « politikan liberecon », kian ajn « socialismon » predikadis « *Narod* », en ĉiu okazo, mia kredo en la politika kaj sociala liberiĝo de l'rusa popolo eliradis el Evangeliaj fontoj; tiu kredo estis subtenata per la plej profunda konvinko, ke Kristo estis efektive la Filo de l'Dio Vivanta, la Savinto kaj la Elaĉetinto de l'mondo, ke Lia eklezio sur la tero estas la konservejo de Lia viva vero.

Pastroj de l'eklezio, similan kredon nun posedas ne mi sola. Ne mi sola kredas kaj scias, ke en la vivema forto de l'Dia ins-

Memoru bone, ke ĉiu abono estas pagota autaŭe, NE FINE de jarabono.

truo de l'Sinjoro estas kaŝita la plej granda fonto de l'politika kaj ekonomia libereco.

Mi kredas kune kun multaj aliaj, ke ni ne povas efektiviĝi la Dian Regnon, ke ni ne povas plenumi la Sinjoran amon, se ni daŭrigos lasi flanken la tutan komplikecon de politiko-ekonomiaj rilatoj inter la homoj, kiun malkovras antaŭ niaj okuloj la nuna tempo kaj kiu potence diras al ni ; iru kaj faru bonon, liberigante tiujn, kiuj estas en politika kaj en sociala kaptitejo. Ĉu estas permeseble ke tiu sfero de l'sociala vivo, tiu kaptiteco, tiuj suferoj restu ekster la viva amo de Kristo; kiu forviŝas larmojn ? Ĉu Kristo dividiĝis ? Ĉu la Sinjoro ne estas ĉio kaj en ĉio ?

Pastroj de l'eklezio ! Mi kuraĝas nun adresi al vi la plej profundan demandon de mia religia konscienco kaj de l'konscienco de multaj aliaj. — Se ni prave pensas kaj kredas, proklamu laŭte kaj maltime antaŭ la vizaĝo de tuta rusa nacio, ke nia kredo estas vera, kaj malpravigu tiujn, kiuj ĉasas kaj persekutas nin ; proklamu, ke en nomo de Kristo devas malaperi por ĉiam de l'supraĵo de la tero rusa ĉia senrajteco, ĉia politika premo, ĉia sklavigo de l'malsata popolo per la sata kapitalo, ĉia hommalamo, ĉia nacia malpaco, ĉia perforto !

Se kontraŭe nia kredo estas eraro kaj malsavo, tiam malpravigu ne *ilin*, sed *nin*...

Plisaĝigu nin, montru al ni niajn erarojn, sed nur erarojn, ĉar ni estas plene sinceraj.

Diru al tuta rusa societo kaj pruvu al ĝi, ke amo Krista povas kunekzisti kun punaj taĉmentoj, kun militkampaj juĝejoj, kun duonmiliono da homoj enŝlositaj en malliberejoj, kun senrajteco, kun premo, kun malsato, kun potenca sklavigo de l'laboro per la kapitalo.

Igu nin konscii nian eraron kaj ni malkonfesos nian konvinkon ; ĉar la vero estas al ni plej kara ol ĉio alia.

Sed ne silentu !...

Ĉar via unua devo estas defendi la Evangelian veron.

Multaj abonoj komencas en januaro ; vidu la daton de via abono.

Car vi estas devigataj antaŭ la Sinjoro batali kontraŭ ĉia herezio.

Ĉar vi devas ekaŭdi la voĉon de viaj spiritaj infanoj.

Ne silentu, pastroj de l'Rusa eklezio!

Aŭ benu nin pro nia religia-sociala laboro.

Aŭ montri al ni en kio, kiel kaj kial ni malprave pensas.

V. LAŜNJUKOV

Redaktoro de l'religia sociala gazeto « *Narod* ».

LETERO EL GERMANUJO

Grandan surprizon kaŭzas la neatendita reveno de la apostaziĝinta ekspastro katolika, barono de Zucco, al la katolika eklezio. Antaŭ lia apostazo, li multjare laboris en sia Aŭstra patrujo. Poste li edziĝis kaj fariĝis libera predikisto kaj socialdemokrata propagandisto en Majnc'o (Mayence). Nun li disiĝis de sia edzino, kompreneble post konvena provizo, forlasis Majenc'on kaj iris monakejon. Samtempe li publikigis jenan sciigon en ĵurnalo; « Erari estas io homa, sed obstine pro necedemo restadi en la eraro ne estas inda de homo naturdotita per sana prudento. Ne pelita de eksteraj cirkonstancoj, sed urgita de plej interna konvinko kaj de revekiĝinta kreda sentado, mi fine ekkonis ke mi treege eraris. Mi aprobas, rekonas kaj konfesas, ke la katolika Eklezio, kiel eldia savejo, estas la reprezentanto de la plej alta surtera aŭtoritato kaj de la plej perfekta rajt-idealo. La pastraron katolikan kaj la katolikan popolon mi petas, ke ili bonvolu pardoni al mi la kaŭzitan skandalon. »

KARLO ZACHERL (El Passaŭ).

KONGRESO DE LA GERMANAJ KATOLIKOJ

Fine de Aŭgusto, en la regiono de la karbaj kaj feraj minoj en la granda urbo Essen'o okazis la kongreso de la germanaj katolikoj. La unua rigardo montris al ni homojn, tre multe da homoj. La stratoj kaj placoj estis belege ornamitaj. Estis la sabato posttagmeze, kiam ni iris ĉirkaŭe tra Essen' kaj ni tre

La Direktoro bezonas monon, ĉar la presisto, la kompostistoj ktp. bezonas monon.

miris, ne vidante eĉ unu pastron. Ni ankaŭ eniris en la *Munster* (katedralo), kaj tie ni vidis virojn, virinojn kaj junajn gekristanojn, kiuj vicigis antaŭ la konfesejoj:

La dimanĉon matene la popolamaso estis ankoraŭ pli multa kaj ĉiam aliaj homaj amasoj eliris el la stacidomo. Hodiaŭ estas la festa marŝado de la laboristoj. Oni antaŭ-kalkulis 30.000 partoprenantojn; sed la nombro kreskiĝis, kaj la komitato estis devigata dividi la marŝadon en du partoj, kiuj ne povis marŝi la saman vojon. Estis 42.000 partoprenantoj ĉirkaŭe.

La kongreso estis malfermata per pontifikala meso kiun solenigis la episkopo de Kôln, D-ro Müller. Posttagmeze la laboristoj marŝis tra Essen'; alveninte sur placoj antaŭe difinitaj ili disiris por eniri en 15 diversaj salonegoj, kunvenejoj de la laboristoj. La ĉefa kunveno estis en la festa halo, (granda konstruaĵo el ligno, kiu estas longa kiel 80 m. kaj larĝa kiel 41 m.). En ĉiuj kunvenejoj parolis eminentaj paroladistoj, plimulte el la laboristaro mem. Kardinalo-ĉefepiskopo Fischer el Kôln vizitis 8 el la konvenejoj. Tio okazis dum la posttagmezo. — Oni tre trompiĝis, opiniante, ke nur laboristoj vizitis la kongreson. Ĉiuj rangoj estis reprezentitaj. La ĝenerala, salutata kunveno pruvis sufiĉe tion. Apenaŭ la laboristoj estis lasintaj la halon, kiam nova popolamaso plenigis ĝin. Ĉeestis inter aliaj, jam nomitaj, Monsinjoro Loninger (Direktoro de la instituto, *Anima*, en Rom'); Monsinjoro Santi, el Rom'; grafo Vietinghoff-Schell, el Wien, Profesoro Vrgberg, el la Universitato de Lowen, Belgujo; Pastro Filly, el Metz; Pastro May, el Luxemburg; kaj grafo Praschma, el Schlesien.

En la unua nepublika kunveno, kiu prikonsilas kaj prilaboras la decidojn de la kongreso, la prezidanto legis la salutajan skribadon de la Sankta Patro Pio X-a. En tiu ĉi la Sankta Patro esprimas sian ĝojon pri la fervoro, kiun montris la organiza komitato, kaj tio esperigas lin, ke la favora agado de la kongreso anstataŭos la fervoran preparon, kaj la ĉi jara kongreso estos inda de la estintaj kongresoj. La katolikoj en Germanujo estas — tion la Sankta Patro tre bone scias — tiel kons-

Sendu HODIAŬ vian abonpagon per poŝtmandato (franca aŭ internacia).

tantaj en la kredo kaj tiel efike agemaj, ke ili certe faros grandan servon estonte, al la religio. Ĉiuj estintaj kongresoj montris paŝon antaŭen, kaj ĉiuj montris que la katolikoj el ĉiuj landoj devus ne tiom paroladi, sed iom pli multe agadi. Niaj Kongresoj ankaŭ elmontris ke la batalado por la bono de l'katolikoj, alportas la plej utilan profiton al la nacio. La Papo esperas ke la bonega ekzemplo de la germanaj katolikoj transiros en aliajn landojn kaj revekos la kredon tie, kie ĝi estas malforta aŭ preskaŭ mortis. En Essen', la urbo de la laboro, oni multe zorgas pri la sociala vivado, tio estas laŭdinda; kaj Li esperas, ke la prospero daŭros estonte. Sed oni devas laboradi plie por la konservado de la nepasantaj bienoj; tio ĉi estas ja la celo de ĝenerala, katolika kongreso. Fine la Sankta Patro esprimas siajn plej varmajn bondezirojn kaj donas la apostolan benon.

La kunvenintoj decidis sendi jenan respondon al la Papo

« La 53^o ĝenerala kongreso de la katolikoj germanaj sendas, kiel ĉiuj estintaj Kongresoj, la esprimon de siaj koregaj, respekto kaj fideleco al la Sankta Patro Pio X^s en Romo. La germanaj katolikoj, kun la katolikoj de tuta mondo, devas peni por efektiviĝi la pretendon, ke ilia plej alta Eklezia Estro, la Papo estu plene kaj efektive sendependa kaj libera. Tiun ĉi liberecon kaj sendependecon de la eklezio ni povos rigardi kiel garantiitajn, nur tiam, kiam estos restarigita la stato, en kiu antaŭe estis la Sankta Patro. Dume, ni daurigos partopreni en la necesoj de la *Sankta Sidejo*. Rigardante al la egigantaj malfacilaĵoj, la ĝenerala kongreso petegas ĉiujn germanajn katolikojn, konstante subteni la « *Petran pŝenigon* », (esprimon por ĉiujara mona donaco por la Sankta Patro) por ke la Papo estu kapabla helpi al la Eklezio en ĝiaj mizeroj.

Plue estis akceptitaj la deziroj pri la germana unuiĝo de la sankta lando kaj la favorigado de la *Bonifacia unuiĝo*.

Je la sekvanta tago okazis la unua publika kunveno. Longan tempon antaŭ la kunveno, la policistoj devis fermi la pordojn de la halo, tamen sur la strato, amaso da homoj atendis, kiu nun ne povas eniri. Ĉeestis en la kunveno 12.000 personoj ĉirkaŭe.

Se vi sendos mem vian abonpagon, vi gajnos 0 fr. 50.

La episkopoj estis multaj. La *Landgerichts-Rat* (*Landgericht* regiona juĝistaro; *Rat* honora titolo) Grober, deputato de la « Reichstag » kaj wurtemberga « landtag » salutis la Kongresanojn, la junulojn, la sinjorinojn, kaj la ĵurnalistojn, katolikajn, kaj nekatolikajn.

Dum la kunveno paroladis ankaŭ Kardinalo ĉefepiskopo Fischer, kiu laŭdis la pian sencon de la Essenanoj kaj sciigis, ke ankaŭ alvenos pli malfrue Kardinalo Vannutelli. Tiam *Justiniat* Porsch parolis pri la lerneja demando kaj senreligiigo de la lernejoj; S-o Racke, posedanto de viberkampo, el Mainz, parolis pri familia vivado kaj la societa publika vivado laŭ la kristaj principoj. Meze de la parolado, alvenis responda telegramo de la germana Imperiestro.

Kastelo Wilhelmshöhe.

« Mi volonte akceptis la afablan saluton de la tieaj kunvenintaj katolikoj, kaj mi tre ĝojis pri la certigo, ke la katolika kongreso germana penos servi al la fratigo de la konfesioj kaj de la socialaj kontraŭaĵoj. Pro tiu elmontro de fidela sindonemeco, mi diras al la kongreso mian plej varman dankon. »

Wilhelm J. R.

La ĝojego, kiu post la legado de la telegramo trabruis la halon, dum longa tempo ne volis finiĝi.

Vespere okazis 3 studentaj kunvenoj la kunveno de l'*Unuiĝo de Sankta Vincenco de Paŭlo*; la kunveno de la *Submajstraj Unuiĝoj* kaj la kunveno de la *Windhorst'a Ligo*.

Je la sekvanta tago estis pontifikala rekviemo por la mortintaj anoj de la katolika kongreso. La unuaj matenaj horoj apartenas al la *Popola unuiĝo*. Pôst tio okazis la dua nepublika kunveno. Posttagmeze la studentaj ligoj portantaj standardojn faris ĉirkaŭmarŝadon tra la urbo, kaj portis grandan kronon al la imperiestra monumento.

En la dua publika kunveno parolis Reichstag'a Deputato, *Landgerichtsrat* Burlage pri la *Roma Demando*. Li diris inter aliaj aferoj « Ne la paflegoj devus paroli, sed la justeco. Ni nescias, kiam la tago de la interkonsento venos. Ni ne volas

Pro pagigo per poŝto aŭ banko, ni devas aldoni 0 fr. 50 al la abonprezo.

senkuraĝiĝi pri tio. Nia granda Gorres diris iam : *Neniu estu senkuraĝa, se li estas prava.* Ni malfermu niajn manojn kaj ni subtenu la sanktan patron el lia mizera stato per tiuj premitaj metalaj pecoj, kiujn fiŝo suprenportis el la fundo de la lago Genezaret'a en la manon de Sankta Petro. Fine ni petegu al Tiu Kiu juĝas inter la nacioj por ke Li plimallongigu la tempon de la mallibereco. Ni postulas justecon de la mondo kaj petas helpon de la longe pacienca, sed ankau ĉiapova Dio, kies justemeco daŭras ĉiam.

Tiam Universitata Profesoro Dro Zahn parolis pri arta edukado.

Kavaliro Dro. Kralik, el Vieno, parolis pri la agado por klerigi la popolon ; Seminariestro Laüsberg pri la virina demando.

* * *

La dekduan de Augusto 2000 viroj pilgrimis Werden'on ĉe la Ruhr'o, al la tombo de sankta *Ludgeruso*. La tria nepublika kunveno estis distingata per la partopreno de Kardinalo Vannuteli el Romo. Li parolis *itale* jenon « Mi venas de la Eŭkaristia Kongreso en Tournay, kaj mi vidas kun korega kontentigo la grandan prezentaĵon de la katolika kongreso germana. Veninta Essen'on, mia ĝojo pligrandiĝis pro tio, ke mi povas alporti gajigan komunikaĵon al la kunveno. Lia Sankta moŝto scias tre bone kiel belege estas organizataj la « *katolikaj tagoj* », kaj li tre bone konas iliajn belajn fruktojn por revivigo de la krista spirito en la familio, por la publika vivo kaj precipe por la laboranta popolo. Kun granda ĝojo, la Sankta Patro rigardas kiel la germanaj katolikoj fariĝis granda, kompakta falango kaj fortika turo. Li deziras, ke la aliaj nacioj imitu ilin. Li estas konvinkita, ke la germanaj katolikoj restos unu koro kaj unu animo, unuigitaj per la kredo kaj la ligilo de l'krista amo, precipe de l'amo al la laboristoj. La ŝlosilo por la sukceso de la germanaj katolikoj estas Jesu-Kristo. Sub Lia standardo kaj kun Li prosperos konstante via sukcesplena agado. Por ke tiel estu, la sankta patro komisiis min doni al vi sian benon. Kiu semas, kun la beno de Dio, tiu ankaŭ rikoltos kun la beno de Dio. » — Tiam estis akceptataj diversaj propo-

La 4-a jaro komenciĝis en oktobro ; ĉu vi abonis de oktobro ?

nojn de la komitato pri la karito kaj precipe rekomendon pri la agado fondi unuigojn por batali kontraŭ la senmoreco.

En la tria publika ĝenerala kunveno, la prezidanto salutis la senditon de la papo, Kardinalon Vannutelli. Grafo Galen parolis pri *Bonifacia-unuiĝo* kaj karito; *Landgerichtsrat* de Witt pri *la katolikoj en la familia kaj publika vivado*. Nia celo estas la efektivigo de la krista moreca leĝo, ankaŭ en la familia vivado, kaj ni ĝojas pri ĉiu helpo el la aliaj konfesioj. Per nia politika organizacio, ni volas konservi la emojn de nia moderna, toleranta, leĝa regno, nenion pli kaj nenion malpli. Tiel longe la katolikoj posedos estimindan reprezentaron en la « Reichstag », tiel longe la katolika popolo ne devos timi, ke la konstituciaj rajtoj estu en danĝero. » — Prezidanto Grober aprobis la dirojn de la antaŭa paroladisto, kaj postulis la aplikadon de la moderna regna leĝo ankaŭ por la anoj de la *Societo de Jesuo*, kaj sciigis, ke la proksima paroladisto estas *Jesuito*.

Laŭ tiu ĉi parolo, la « Patro Seiler, S. J. » estas salutata per tondraj aplaŭdoj. Lia temo estis. *La eklezio kaj la sociala demando*. « La urbo Essen' estas nune la korpigo de la socialaj demandoj. En la urbo Essen' troviĝas dupeca laborista armeo: unu armeo kun la standardo de la kruco kaj kun la emblemoj de la fidela patruja amo; la alia armeo estas senkrista, sennacia kun la ruĝa flago de la sanga batalado kaj de la revolucio. Kun Hamleto oni povas diri « La universo estas ekster ĝiaj aksoj. Kia potenco amikigos la kontraŭaĵojn? » — La eklezio! Nur la ĵusteco kaj la Krista amo povos trankviligi la malkvietajn amasojn. La anĝeloj de la paco amikigos la laboristojn. Dankon al Dio! Ni germanaj katolikoj agis tiele kaj agos tiele, kaj kun la spirita estraro ni trovos la ĝustan vojon kaj devos venki. »

Tiam la ĉeestantoj salutis per ventega aplaŭdo la reprezentanton de la Papo, Kardinalon Vannutelli, kiu nun supreniris tribunon por diri al la kunveno kelkajn vortojn. Li esprimis al la aŭskultantoj sian kontentiĝon kaj certigis al ili la miriĝon de la tuta mondo.

Ĵaŭdon, la dudektrian de Aŭgusto, en la lasta nepublika kun-

Mi hontas diri, ke kelkaj ne ankoraŭ pagis por la 3-a jaro.

veno, estis prikonsilataj kaj alprenataj tre gravaj proponoj el la sociala komitato. La prezidanto de la komitato povis certigi, ke la rezultatoj de la konsilado estis kontentigaj. La unua prezentigo de sinjorino estis tre interesa, ŝi donis sian opinion pri la laboristaj unuiĝoj.

La lasta publika kunveno, kiu ligis sin kun la nepublika, estis vizitita de 7-8000 personoj. La altrangaj gastoj aŭskultis kun granda intereso la argumentojn de la paroladistoj ĝis la fino. Laborista sekretario Giesberts parolis pri klopodoj de la Katolikoj pro la solvo de la sociala demando. Tiam la responda telegramo de l'Sanka Patro estis legata.

« Dankema kaj ĝoja en koro, kun espero de riĉa rikolto, vidante la katolikan unuecon kaj la fruktojn por la laboristaj aferoj, la Sankta Patro akceptis la esprimon de la submetigo de la katolika kongreso kaj kun la certigo de sia favora intereso dum la daŭro de la kongreso, li donacas al ĝi la apostolan benon. »

Profesoro Dro Einig parolis pri Dia kredo kaj pri « *rivelita kredo kaj scienco*. La paroladisto pruvis, ke la kredo kaj la scienco devas unuiĝi, ankaŭ la moderna scienco. Rivelita kaj Dia kredo estas tute modernaj, socialaj deziregaĵoj. Meyer-Banfey diris la homaro ne bezonas plu Dion, Li estas superflua por la scienco; Li estas mortinta. La religio estas sentaĵo. Miloj da homoj pensas tiele... La trono de Dio staras fortike; Dio ne estas en danĝero, sed estas en danĝerola popolo, kiun oni kondukas per la senkredo sur la vojo al anarkismo. La eklezio estas la patrino de l'scienco, la eklezio fondis la universitatojn. La eklezio tre bone scias estimi la aliajn sciencojn. La episkopo de Frier ordonas al siaj teologiaj lernantoj, ke ili studu ankaŭ neteologian sciencon. La profesoro Wagner diris en Berlin, foje, ke la episkopo de Frier sendas al li pli da teologoj, ol ĉiuj Prusaj *superintendoj* (honora tilolo por la protestantaj pastroj) kune.

Kardinalo Vanutelli diris adiaŭon en latina lingvo al la kunveno. Li diris, ke li akceptis volonte la inviton de la K'nola

Memoru bone, ke ĉiu abono estas pagota aŭtaŭe, NE FINE de jarabono.

ĉefepiskopo, tial ke ankaŭ la Sankta Patro instigis lin iri al la Kongreso. Post lia foriro, li ĉiam memoros, kun ĝojo, sian ĉeeston ĉe la kongreso.

Prezidanto Grober faris mallongan paroladon pri la agoj de l'kongreso kaj fermis ĝin instigante la kunvenintojn al komuna kaj fervora laboro.

F. VOGEL (El Paderborn).

KANTO MALĜOJA

Kie do kuŝas la lando feina
Kie regadas feliĉo senfina,
Ĝojo daŭranta sen ia doloro
Kaj ne lasanta malĝojon en koro?

Kiam pro suna radio ekfloras
Gaja floreto, nur tagon ĝi brilas,
Baldaŭ ekvelkas jam ĝia kroneto
Tuj ĝi kliniĝas sur sia trunketo.

Kiam la ŝelon birdido rompigis,
Ĝi de l'amata patrino forflugis!
Ne plu ĝi venos al vata nesteto
Restas malĝojo en birdokoreto...

Kiam dum ia varmega somero
Ŝajnas freŝiga al ni la vespero
Fulmo brilegas tra nigra nubego
Koron kvietan ekpremas timego.

Kiam la koro ekbatas pro amo
Lastan fajron eljetas la flamo
Baldaŭ al tombo nin pelas la sorto
Kie malvarme nin kisos la morto...

Blanka tombaro, ĉielo senstela,
Vintro malvarma aŭ nokto malhela
Tuj forgesigas plezuron kaj ĝojon,
De la sufero signante la vojon.

Multaj abonoj komencas en januaro ; vidu la daton de via abono.

Dolĉe forflugu, ho mia kanteto :
 Povas sur lipo aperi rideto ;
 Ĉiam premadas min akra doloro
 Ĉiam malĝojo restadas en koro...

Ne sur la tero troviĝas la lando feina.
 Kie regadas sennube feliĉo senfina.
 Supren ni levu l'okulojn al brila ĉielo :
 Tie sin trovas, en Dio, de l'vivo la celo.

Dr. RĚM:

UNUA KOMUNIĜO DE JUNA APOSTOLO

Kiam la unuaj el miaj infanoj plenumis sian unuan komuniĝon, tion mi tute malatentis. Al ilia patrino mi lasis la zorgon regi la junan infanaron, plene konfidante al ŝi, senkonscie pliboniĝante pro la influo de ŝia virto, kiun mi sentis, sed ne vidis.

Naskiĝis la lasta. Tiu kompatinda infano havis sovaĝan karakteron kaj negrandan inteligenton; kvankam mi lin amis ne malpli ol la aliajn, tamen pli facile mi inkliniĝis al severeco kontraŭ li. La patrino diris al mi « Havu paciencon; en la epoko de la unua komuniĝo li ŝanĝiĝos. » Al mi ŝajnis neverŝajna tia ŝanĝiĝo en horo ĝuste antaŭfiksita. Tamen la infano ekvizitis katekismon, kaj mi vidis, ke efektive li pliboniĝas en maniero facile rimarkebla kaj tre rapida. Tion mi ekatentis. Mi vidis, ke tiu spirito disvolviĝas, ke tiu juna koro kontraŭ si batalas, ke tiu karaktero plidolĉiĝas, fariĝas obeema, respektema, amema. Mi admiris tiun laboron, kiun ne faras racio ĉe plenaĝuloj; kaj la infano ĝis tiam la malplej amata fariĝis por mi la plej kara.

Samtempe mi grave pripensis tian mirindaĵon. Mi ekaŭskultis la katekismajn lecionojn. Aŭskultante, mi rememoris miajn kursojn pri filozofio kaj moralo. Tiun instruadon mi komparis kun la moralo, kies praktikadon mi vidis en la mondo,

La Direktoro bezonas monon, ĉar la presisto, la kompostistoj ktp. bezonas monon.

ve ! ne ĉiam sukcesinte mem ĝin eviti. La problemo pri bono kaj malbono, al kiu mi evitis ekrigardi pro nekapableco ĝin solvi, stariĝis antaŭ mi en terura lumo. Mi demandis la knabeton ; li respondis en maniero, kiu min disprenis. Mi sentis, ke kontraŭdiroj estus hontindaj kaj kulpaj. Mia edzino observis kaj nenion diris ; sed mi vidis ŝian diligenton en preĝado. Sendormaj estis al mi la noktoj. Ilian ambaŭan senkulpecon mi komparis kun mia vivo, ilian ambaŭan amon kun la mia ; kaj mi pensis Ion amas en mi mia edzino kaj mia infano, kion nek en ili, nek en mi mi amis mian animon.

Komenciĝis la semajno de la unua komuniĝo. Jam ne amon al mi inspiris la infano, sed senton, kiun mi ne komprenis, kiu ŝajnis al mi stranga, preskaŭ hontiga, kaj kelkafoje montriĝis en kvazaŭa inciteco. Respekton al li mi sentis. Pli alte ol mi li staris. Antaŭ li mi ne kuraĝis esprimi iajn ideojn, kiujn al mi vekis en la spirito tiu stato de batalo kontraŭ mi mem, en kiu mi estis. Mi ne volus, ke ili impresus al li.

Nur kvin au ses tagoj restis por pasigi. Iun tagon, matene, ĵus ĉeestinte la meson, venis al mi la infano en mian skriboĉambron, kie sola mi estis. « Paĉjo, li diris, en la tago de mia unua komuniĝo mi ne iros al la altaro, ne petinte de vi pardonon pri ĉiuj kulpoj, kiujn mi faris kaj pri ĉiuj ĉagrenoj, kiujn mi kaŭzis al vi ; kaj vi donos al mi vian benon. Bone pripensu ĉion malbonan, kion mi faris, por min riproĉi pri tio, por ke mi ne refaru ĝin, kaj vi pardonos al mi.

— Infano mia, mi respondis, ĉion pardonas patro al infano eĉ nesaga ; sed ĝoje mi povas diri, ke nenion mi havas por pardonon al vi. Kontenta pri vi mi estas. Daŭrigu laboradi, bone ami la bonan Dion, fidele plenumi vian devon ; la patrino kaj mi estos plej feliĉaj.

— Ho ! paĉjo, la bona Dio, kiu vin tiom amas, helpos al mi, por ke mi fariĝu via konsolanto, kiel mi deziras. Bone preĝu al li por mi, paĉjo.

— Jes, kara infano mia. ».

Sendu HODIAŬ vian abonpagon per poŝtmandato (franca aŭ internacia).

ŠVIESOS LAIŠKELIS

SAVAITINIS POLITIKOS LAIKRAŠTIS.

„ŠVIESOS LAIŠKELIO“ kaina su prisiuntimu Vilniuje ir kitur: metams—1 r., pusmečiui—50 k., 3 mėnesiams—25 k. Užsirašusiems „Šviesą“—„Šviesos Laiškelis“ siunčiamas veltui (dikai).

Laiškai ir pinigai laikraščio apmokėjimui siūsti reikia pagal šio adresą: Vilnius, Odinė (Koževenaja) gatvė, № 11 „ŠVIESOS“ ir „ŠVIESOS LAIŠKELIO“ Redakcija ir administracija.

Lietuviai Sąvalkiečiai nesnauskite.!

Paskutiniuose dienose prasidėjo Petrapilyje tarybos tarp ministerių pirmininko Stolipin'o ir kairiųjų pakviestų iš Lenkijos žmonių kas link įvedimo Lenkijoje savyvaldos. Sako, buk to klausimo išrišimas linksta į gerą lenkams pusę. Sako teipat, kad kaip tik Lenkijos savyvalda bus valdžios patvirtinta, tuojaus bus ir į gyvenimą įvesta.

Kaip žinoma, nuo Napoleono pirmojo laikų Sąvalkų gubernijos lietuviai liko prijungti visai be pamatų prie teip vadinamos „Lenkų karalystės“ ir dabar priklauso Varšavos general-gubernatorystei. Žinomi mums teipat gerai ir lenkų apetitai ant Sąvalkų Lietuvos. Jie ir dabar stengsis visais būdais, kad tik Sąvalkų gubernija patektų į Lenkijos savyvaldą. Šu savyvaldos įgavimu lenkų kalba taps valdiška visame tame krašte, kurį toji savyvalda apims, tokiu būdu ir Sąvalkų lietuviškuose pavietuose. Tas būtų labai pavojinga mūsų tautai ir lietuviškajai kalbai ir nemažai padėtų nela-

bam lenkinimo darbui. Mūsų tėvynė tuomet būtų į tris neva dalis suskaldyta, būtų jau ne tik po Prusu, Rusu, bet ir po Lenku. O mes jau tik gerai rodos žinome tą lenkų globą! Drauge su tėvyne suskiltų tada ir mūsų tautos spėkos. Tą atjausdami ir žinodami jau pernai Sąvalkiečiai lietuviai nutarė Pirmamjame Didžiame Lietuvių tautos atstovų susivaižiavime Vilniuje, kad Sąvalkų Lietuva turi buti atskirta nuo Lenkijos, nors ta ir gautų antonomiją, o Lietuva ne, nes geriausias buti kuopoje, kad ir be antonomijos, negu Lenkų Antonomijoje. Tą nutarimą atmindami, atmindami savo bočių kovas su lenkais dėl Lietuvos nepadalytimo, turėdami omenyje ir širdyje Lietuvos bendrą labą Sąvalkiečiai lietuviai turi dabar, kaip vienas vyras, garsiu balsu pakelti protestą prieš priskirimą Lietuvos dalies prie Lenkijos, Turi pranešti rusų valdžiai, kad nenori, idant lietuvių krašte būtų įvesta lenkiškoji savyvalda ir kalba, kad Sąvalkija drauge su visa Lietuva turi gauti savo atskyrą savyvaldą, su lietuvių kalba teismuose, valsčiuose ir mokykluose (teipogi ir bažnyčiose), turi parodyti kad yra lietuviai, ne lenkai. Tąsyk lenkai negalės niekam apdumti akių, nes visi matys, kad tikrai to nenori tauta, šalies gyventojai. Turime reikalauti garsiai savo tiesų! Lenkai reikalauja, šaukia, štai jiems jau ir rengiasi duoti savyvaldą valdžiai, nors ir nėra teip duosni! Savo reikalavimus Sąvalkiečiai lietuviai turi siųsti Petrapilyn per valščių suėgų nutarimus. Siųsti tuos nutarimus reikia ant ministerių pirmininko Stolipin'o vardo. Tą daryti reikia neatidedant, kuo greičiausiai. Jau pirmasai protestas liko pa-

siųstas ministerių pirmininkui nuo Sąvalkiečių lietuvių gyvenančiųjų Vilniuje. Stai jis :

„Kaipo atlyginimą lenkams už suteiktą pagelbą, Napoleonas I steigdamas Varšavos kunigaikštystę vėliaus, per Vienos kongresą Lenkų Karalyste pavardintą, prijungė ant mūsų nelaimės, prie jos, ignoruodamas vietinius lietuvius, ir Lietuvos dalį, šiandieninę Suvalkų guberniją, kurioje ligšiol kuone vi surgyvena lietuviai. Dabar iš priežasties jūsų derybų su tos „Lenkų Karalystės“ atstovais apie įvedimą savyvaldos su lenkų kalba administracijoje, mes lietuviai energiška protestuojame prieš įvedimą lenkiškos savyvaldos mūsų, Lietuvių, krašte su visiškai svetima mums lenkų kalba ir reikalaujame, įvedant į Suvalkų gub. savyvaldą, dėl žmonių nuraminimo, įvesti tuo pačiu laiku į mūsų gubernijos teismą, mokyklą ir administraciją lietuviškąją kalbą, kaip daugumos gyventojų kalbą“.

Suvalkų lietuviškieji pavietai neprivalo jokiu būdu įeiti į Lenkijos savyvaldos ribas! Būtų tai gėda Sąvalkiečiams lietuviams, netik gėda, bet ir didelė nelaimė! Nesnauškite tatai, vyrai! Lietuvystė pavojuje!

Lenkomanų siulomas į Dūmą atstovas nuo Vilniaus miesto.

Vilniaus lenkomanai, pastatę savo kandidatą į Dūmą, perša jį dabar visiems per savo laikraštį. Tuo jų kandidatu yra kunigas Maciejevičius. Lenkomanų dienraštis „Dziennik Wileński“ buvo parašęs dėl jo kandidatus pastatymo, kad lenkų rinki-

kų komitetas kaip nenorėtų, bet geresnio kandidato pastyti nebegalėtų — ir išmintingas ir žinomas ir visų gerbiamas. Iš „Dzienniko“ tat išeina, jog p. M. esąs vienu-vienas žmogus, kurs tinka į atstovus nuo Vilniaus. Tačiau ne visi yra tokios nuomonės kaip ponai lenkomanai. Štai rusiškas pirmeivių dienraštis „Siev.-Zap. Golos“ apie lenkomanų „kandidatą“ sako: „kaipo apie žmogų mes žinome apie jį tik tą, kad turi dvi koji, dvi aki, dvi ranki ir t. t. ir kad ne rinkimų klausimas mes ir numirtumėme teip ir nežinojė ar yra kur toks. Kas lytisi jojo visomeniškojo veikimo žinome tik tą, kad jisai yra kunigas ir savo veikimą rodo mišių laikime ir pamokslų sakyme konst.—katalikiškos partijos susirinkimuose; nė užsielnė sau paminklo už gyvenimo... Ot sau, kunigas kokių daug pasaulėje, jeigu ne blogesnis, tai ir ne geresnis kitų... Kas link k. Mac. proto—nieko ir nekur nesame girdėję, lyg jo pas jį ir visai nebūtų buvę... Ne, jau mes pajieškosimė sau kokio nors kito“. Nuo to, ką parašė apie kun. M. rusų dienraštis, atimti nieko negalima, bet tik dadėti dar tą, jog kun. Mac. yra vienas iš didžiausių lietuvių tautos nevydonų. — Todėl ir mes, lietuviai Vilniečiai, lygiai pajieškosime sau kito kandidato. Lai sau vedasi jį į Dūmą vieni lenkomanai, bet tik ar praves? Galima abejuoti...

Iš Irkucko praneša, kad ties geležinkelio stočia „Mandžurija“ kilo džumos liga.

Redaktorius ir leidėjas kunigas Juozupas Ambrāziejus.

M. Kuktos spaustuvė. Dvorcovāja, 4.

Li rigardis min per malsekaj okuloj, kaj ĉirkaŭprenis al mi la kolon. Ankaŭ mi estis tre kortuŝita.

« Paĉjo?... li daŭrigis.

— Kion, kara mia?

— Paĉjo, mi havas ion por peti de vi. »

Tion mi bone sentis, ke li deziras ion peti; kaj kion li deziris, tion mi bone sciis! Kaj, ĉu mi konfesos? Tion mi timis; tiel malkuraĝa mi estis, ke mi provis profiti lian ŝanceliĝon.

« Lasu min, mi diris, nun okupata mi estas. Vespere aŭ morgaŭ vi diros al mi, kion vi deziras; kaj se konsentos la patrino, tion mi donos al vi.»

Tute konfuza, la kompatinda infano perdis kuraĝon, kaj, kisinte min denove, foriris malgaje en kabineton, kiu estis por li dormejo, inter mia skriboĉambro kaj la dormoĉambro de lia patrino.

Mi riproĉis min pri la ĉagreno, kiun mi ĵus donis al li, kaj precipe pri la sento, kiu min instigis. La karan infanon mi sekvis, paŝante sur la pinto de l'piedoj, por lin konsoli per ia kareso, se mi lin vidos tro malgajan. Ne tute fermita estis la pordo. Senbrue mi ekrigardis. Surgenu antaŭ malgranda figuraĵo de la Sankta Virgulino, li estis tutkore preĝanta. Ha! kredis min, en tiu momento mi sciigis, kiel povas impresi al ni apero de anĝelo!

Mi revenis al mia skribtablo kaj sidiĝis kun la kapo en la manoj, preskaŭ plorante. Tiel mi restis kelkajn momentojn. Kiam mi relevis la kapon, antaŭ mi staris mia fileto kun vizaĝo tute plena de timo, de decido kaj amo.

« Paĉjo, li diris, kion mi volas peti, neprokrastebla ĝi estas, kaj certe konsentos la patrino en la tago de mia unua komuniĝo, venu kun ŝi kaj mi al la sankta tablo. Ne rifuzu al mi, Paĉjo. Tion faru por la bona Dio, kiu vin tiom amas. »

Ha! mi ne provis plue disputi kontraŭ tiu granda Bona-Dio, kiu tiel bonvolis min perforti. Plorante, mi premis mian infanon al mia koro.

« Jes, jes, mi diris, jes infano mia, tion mi faros. Tuj kiam

vi volos, eĝ jam hodiaŭ, prenu mian manon, konduku min al via konfesprenanto, kaj diru al li: Jen mi alkondukas la patron. »

LOUIS VEUILLOT. (Trad. P. C.)

LA LASTA ABENCERAĜO DE CHATEAUBRIAND (*Sekvo*)

Tiele kantis Laŭtrek :

Kiom rave mi memoras
Ĉarman naskigejon mian !
Kiom brilaj estis tagoj
En Franclando !
Cin mi amos, lando mia,
Ĝis la morto !
Ci memoras pri patrino,
Ĉe l'fajrejo de l'dometo ;
Ŝi nin sur kor' sia premis,
Ho ! Fratino !
Kaj la harojn blankiĝintajn
Ni kisetis ?
Karulino, ci memoras
Pri l'kastelo baniĝanta

En la Dor'o, pri la Turo
De la Maŭroj.
Kie dolĉe sonoradis
Tagreveno ?
Ci memoras la laĝeton,
Surflugitan de hirundoj ;
Kie vento sur kanetojn
Blovetadis ;
Kie milkolora suno
Subakviĝis ?
Cin revidi, kara Helnjo !
Kaj majestan nian kverkon,
Kaj montaron, mi deziras
Kun ĉagreno !...
Cin mi amos, lando mia,
Ĝis la morto !

Laŭtrek, finante la lastan strofon, viŝis per sia ganto larmon, kiun eltiris de li memoro de bela Franclando. La bedaŭroj de l'ĝentila kaptito estis forte sentitaj de Aben-Hamet, kiu ĝemis kiel Laŭtrek, la perdon de sia patrolando.

Petata por preni siavice la gitaron, li ne volis, dirante ke li nur konis unu romancon, kaj ke ĝi ne estus agrabla al kristanoj.

— Se en ĝi nekristanoj ĝemas pri miaj venkoj, diris malŝate don Karlos, kantu ; larmoj estas permesataj al venkitoj.

— Jes, diras Blanka ; kaj same pro tio, niaj prapatroj, iam submetiĝitaj al jugo de l'Maŭroj, postlasis tiom da popolkantoj. Do, Aben-Hamet kantis tiun baladon kiun li estis lerninta el poeto de l'Abenceraĝa gento :

Pro pagigo per poŝto aŭ banko, ni devas aldoni 0 fr. 50 al la abonprezo.

Reĝo Juano,
 Iam radjante.
 Vidis sur monto
 Grenad' Hispanan ;
 Al ĝi li diris :
 Koron mian
 Kun mia man'
 Al ci mi donos ;
 Kun ci edziĝos,
 Al ci donacos
 Belan Sevil'on,
 Faman Kordob'on ;
 Orajn ornamojn,
 Brilajn perlojn
 Aldonos mi
 Por amoj niaj !
 Diris Grenado
 « Reĝo Leon'a,
 Mi jam ligata
 Estas al Maŭro.
 For la donacoj !
 Ornamita
 Per zono, mi,
 Per fortaj idoj !

Tiel parolis,
 Tiel mensogis,
 — Insulto granda !
 Grenad' perfida.
 De kristanaĉo
 Forpeliĝis
 Abenceraĝ'
 Estis skribita !
 Ne plu kamelo
 Al la tombejo
 Apud banejo
 Portas Haĝi'on.
 De kristanaĉo
 Forpeliĝis
 Abenceraĝ'
 Estis skribita !
 Ĉarm' de l'Alhambra !
 Hejmo de Allah !
 Urb' de fontanoj,
 Granda Rivero.
 De kristanaĉo
 Forpeliĝis
 Abenceraĝ'
 Estis skribita !

La naiveco de tiuj plendoj kortuŝis eĉ la fieran don Karlos, malgraŭ la malbenaĵoj diritaj kontraŭ la kristanoj. Li tre deziris ke oni ne postulu de li kanton ; sed, pro ĝentileco por Laŭtrek, li alkonsentis liajn petojn. Aben-Hamet donis la gitaron al la frato de Blanka, kiu kantis la glorajn de l'Cid, lia fama prapatro.

Forironta al bordoj afrikaj,
 Cid, armata, fiero pro bravec',
 Kun gitaro, al sia Ĥimeno
 Verse kantis Honoron kaj Amon
 « Vi ordonis : batalu la Maŭron ;
 Sed venkinta revenu el milit'.

La 4-a jaro komenciĝis en oktobro ; ĉu vi abonis de oktobro ?

Mi, Rodrigo, akceptos adoron,
 Se pro l'Honor' vi Amon forgesos. »
 Donu, donu la brilajn armilojn!
 Mi ja pruvos kuragon de Rodrig'
 En bataloj, sentima, bravega,
 Krios li: « Pro Himeno, Honoro »!
 Maŭro fama pro la ĝentileco,
 Ciajn kantojn superos mia kant'
 La Hispanoj ĝin ĉie kantados,
 Ĉar ĝi pentras Honoron kaj Amon!
 En la valoj de l'Andalusio
 La kristanoj rakontos pri Rodrig',
 Diros, ke pli ol vivon li amis
 Dion, Reĝon, Himenon, Honoron!

Don Karlos, kantante tiujn vortojn per vira kaj sonora voĉo, ŝajnis tiel fiera, ke oni povis diri: estas la Cid'o mem. Laŭtrek, partoprenis la militeman entuziasmon de sia amiko; sed l'Abenceraĝo paliĝis je la nomo de Cid'.

« Tiu kavaliro, li diris, kiun la kristanoj nomas: Floro de l'bataloj, estas nomika ĉe ni « Kruelulo ». Se lia grandanimo estis egala al lia braveco..... »

— Lia grandanimo, vivege respondis don Karlos, superis lian bravecon, kaj nur Maŭro povas kalumnii la heroon el kiu mia familio devenas.

— Kion, ci diras? ekkriis Aben-Hametantaŭensaltante de la seĝo, kie li estis kvazaŭ kuŝinta; ĉu ci kalkulas la Cid'on inter ciaj prapatroj?

— Lia sango fluas en miaj vejnoj, respondis don Karlos; kaj mi rekonas ke mi portas ĉi tiun noblan sangon pro la malamo, kiu brulas en mia koro kontraŭ la malamikoj de mia Dio.

— Tiel, diris Aben-Hamet rigardante Blanka, vi estas idino de tiuj Bivaroj kiuj, post la kaptado de Grenad', eniregis la hejmojn de l'malfeliĉaj Abenceraĝoj kaj mortigis maljunan same nomitan kavaliron, kiu defendis la tombon de siaj prapatroj!

— « Maŭro, ekkriis don Karlos, kvazaŭ flamigita prokolero, sciu ke mi ne permesas ke oni min demandu. Se hodiaŭ mi posedas

Mi hontas diri, ke kelkaj ne ankoraŭ pagis por la 3-a jaro.

la restbienojn de l'Abenceraĝoj, miaj prapatroj akiris ilin per sia sango, kaj ili nur ŝuldas ilin al sia glavo.

— Ankoraŭ unu vorton, diris Aben-Hamet plikaj pli kortuŝata; en nia ekzilo ni malkonis, ke la familio de l'Bivars' havis la titolon de Santa Fe; kaj tio min trompis.

Don Karlos respondis: al tiusama Bivar, venkinto de l'Abenceraĝoj, tiu nobeltitolo estis donata de Ferdinando la Katolika.

La kapo de Aben-Hamet kliniĝis sur lian bruston: li staris inter don Karlos, Laŭtrek kaj Blanka mirigitaj. Du larmriveroj fluis el liaj okuloj sur la ponardon ligita al lia zono.

« Pardonu, li diris, la homoj mi scias, ne devas verŝi larmojn, de nun la miaj ne fluos plu eksteren, kvankam restas al mi multaj kaŭzoj por plori; aŭskultu min

Mia amo por ci, Blanka, egalas la varmecon de la brulaj ventoj de l'Arablando. Mi estis venkita sen ci mi ne povis plu vivadi. Hieraŭ, vidante tiun francan kavaliron preĝantan, kaj ankaŭ aŭdante ciajn parolojn en la tombejo de l'templo, mi decidis koni cian Dion kaj oferi al ci mian kredon.

Gaja movo de Blanka kaj mira movo de don Karlos, interrompis Aben-Hamet'on. Laŭtrek kaŝis sian vizaĝon en la manojn. La Maŭro divenis lian penson kaj skuante la kapon kun dolorega rideto:

« Kavaliro, diris li, ne forlasu ĉiun esperon; kaj ci, Blanka, ploru ĉiame la lastan Abenceraĝon! »

Blanka, don Karlos, Laŭtrek, levas ĉiuj la manojn al ĉielo, kaj ekkrias:

« La lasta Abenceraĝo! »

Regas silento; timo, espero, malamo, amo, miro, jaluzeco agitas la korojn; baldaŭ Blanka surgenuen falas.

« Dio de boneco! ŝi diris, ci pravigas mian elekton; mi povis ami nur heroidon! »

— Mia fratino, ekkriis don Karlos kolere, pripensu do ke vi estas tie ĉi antaŭ Laŭtrek!!

— Don Karlos, diris Aben-Hamet, ĉesigu cian koleron; mi estas kiu devas redoni al vi trankvilecon. »

Memoru bone, ke ĉiu abono estas pagota antaŭe, NE FINE de jarabono.

Tiam, sin turnante al Blanka, kiu de nove sidiĝis :

« Hurio de l'ĉielo, genio de amo kaj beleco, Aben-Hamet estos cia sklavo ĝis sia lasta elspiro ; sed ekkonu la amplekson de sia malfeliĉeco.

La maljunulo mortigita de cia prapatro, kiam li defendis siajn hejmojn, estis la patro de mia patro ; eklernu ankoraŭ sekreton, kiun mi kaŝis al ci, aŭ kiun mi forgesis pro ci.

Kiam por la unua fojo mi vizitis tiun malĝojan patrolandon, mi precipe celis serĉi, ian Bivar'idon, por venĝi min kontraŭ li pro la sango verŝita de liaj patroj.

— Nu ! diras Blanka per voĉo dolora, sed subtenita per akcento de grand'animo, kia estas cia decido ?

— Nur tiu, kiu estas inda de ci, respondis Aben-Hamet : redoni al ci ciajn ĵurojn, kaj plenumi per mia eterna foresto kaj mia morto, tiun devon kiun ambaŭ ni ŝuldas al la malamikeco de niaj dioj, de niaj patrolandoj kaj familioj.

Se iam la imago de mia vizaĝo foriĝos de cia koro, se la tempo, kiu ĉion detruas, forprenos de ci memoron pri l'Abenceraĝo,... tiu franca kavaliro... Ci ŝuldas tiun oferon al cia frato. »

Laŭtrek leviĝas vivege, kaj sin ĵetas en la brakojn de l'Maŭro.

« Aben-Hamet ! ekkrias li, ne kedu venki min pri la nobleco : mi estas Franco ; per Bajar' mi fariĝis kavaliro ; mi elverŝis mian sangon por mia reĝo ; mi estos, kiel mia baptopatro kaj kiel mia princo, sentima kaj senriproĉa. Se ci restos inter ni, mi petegas don Karlos'on, ke li donu al ci la manon de sia fratino ; se ci forlasos Grenad'on, neniam vorto pri mia amo maltrankviligos cian amatinon. Ci ne kunportos en cia ekzilo la malbonan penson, ke Laŭtrek, netuŝita de cia virto, volas profiti cian malfeliĉon, »

Kaj la juna kavaliro premis la Maŭron sur sia brusto, kun franca fervoro kaj viveco.

« Kavaliroj, diris don Karlos' siavice, mi ne pensis alie pri viaj glorigaj rasoj. Diru, Aben-Hamet, per kiu signo mi povas ekkoni, ke vi estas la lasta Abenceraĝo ?

Multaj abonoj komencas en januaro ; vidu la daton de via abono

— Per mia konduto, respondis Aben-Hamet.

— Mi admiras ĝin, diris la Hispano; sed antaŭ ol mi parolos, montru al mi signon ian de via deveno.

Aben-Hamet eltiris el sia brusto la heredan ringon de l'Abenceraĝoj, kiun li portis pendantan per ora ĉeno.

Vidante tiun signon, don Karlos prezentis la manon al la mal-feliĉa Aben-Hamet.

« Sinjoro Kavaliro, diris li, mi certigas ke vi estas saĝulo kaj vera reĝido. Vi honoras min per viaj intencoj pri mia familio; mi akceptas la batalon kiun sekrete vi serĉis. Se mi estos venkita, ĉiuj miaj posedaĵoj, antaŭe viaj, estos fidele redonitaj al vi. Se vi forlasos la intencon - batali, akceptu viavice tion, kion mi proponas al vi; estu kristano kaj ricevu la manon de mia fratino, kiun Laŭtrek por vi postulis. »

La tento estis granda; sed ĝi ne superis la fortecon de Aben-Hamet. Unue l'amo kun sia tuta povo parolis en la koro de l'Abenceraĝo; aliparte, li ne povis pensi sen terurego pri la ideo unuigila sangojn de l'persekutintoj kaj persekutitoj. Ŝajnis al li, ke li vidis la fantomon de sia prapatro, elirantan el la tombo, kaj riproĉantan al li tiun malpiegan edziĝon.

Trapikita de doloro, Aben Hamet ekkrias:

« Ho! kial mi tie ĉi renkontis tiom da superegaj animoj, tiom da noblaj karakteroj, por sentigi al mi pli akre tion, kion mi perdas!

Blanka pridecidu: Ke ŝi diru kion mi devas fari por esti plej inda de ŝia amo!

Blanka ekkrias:

« Reiru alla dezerto! » kaj ŝi svenis. Aben-Hamet teren kuŝiĝis, adoris Blanka'n ankoraŭ pli ol la ĉielon, kaj eliris ne eldirante unu vorton.

La saman nokton, li foriris al Malaga kaj enŝipiĝis sur ŝipon albordiĝontan en Oran'o. Li renkontis, apud tiu urbo, karavanon, kiu trijare deiras de Maroklando, transas Afrikon, eniras Egiptolandon kaj kuniĝas en Jemen' kun karavano de La Mekh'? Aben-Hamet kuniĝis kun la pilgrimuloj.

Blanka, kiun morto unue minacis, reviviĝis. Laŭtrek fidela

La Direktoro bezonas monon, ĉar la presisto, la kompostistoj, ktp. bezonas monon.

je la juro, kiun li faris al l'Abenceraĝo, foriĝis, kaj nenia vorto pri lia amo aŭ doloro maltrankviligis la melankolion de l'filino de Santa-Fe'a duko. Ĉiujare, ŝi iris sur la montojn de Malaga je l'tempo, kiam ŝia amanto kutimis reveni el Afriko; ŝi sidiĝis sur ŝtonegojn, rigardis la maron, la malproksimajn ŝipojn, kaj poste reiris Grenalon; ŝi pasigis la ceterajn tagojn inter la ruinoj de l'Alhambra. Ŝi ne plendis, kaj ne ploris; ŝi neniam diris vorton pri Aben-Hamet: nekonantulo kredas, ke ŝi estas feliĉa.

Ŝi restis sola el sia familio. Ŝia patro mortis pro ĉagreno, kaj don Karlos estis mortigita en duelo, en kiu, Laŭtrek estis dua atestanto. Oni neniam sciis, kia estis la sorto de Aben-Hamet.

Kiam oni eliras el Tunis'o tra la pordo, kiu kondukas al ruinoj de Kartago, oni alvenas al tombejo sub palmo, en angulo de tiu tombejo, oni montris al mi tombon nomitan: *la tombo de la lasta Abenceraĝo*. Nenio rimarkinda en ĝi; la tomba ŝtono estas tute glata; sed, laŭ, kutimo de l'Maŭroj, oni fosis meze de tiu ŝtono kaveton per ĉizilo. Pluvakvo amasiĝas funde de tiu funebra pokalo, kaj taŭgas, en varmega klimato, por sensoifigi la birdon ĉielan.

El franca lingvo tradukis ELEDA KAJ VINKO.

FINO.

LA PUNO

LEGENDO ORIGINALE VERKITA DE LUIS CARLOS

La vilaĝo San Rafaelo, kiel aliaj multaj ĉi-tieaj vilaĝoj, havis melankolian kaj funebran ŝajnon: ĝiaj dometoj dubenigraj, malnovaj, ŝanceliĝantaj konstruaĵoj kaj malpuraj marĉaj stratoj, kondukantaj ĝis la malsupro de grandegaj montoj, iam kronitaj de estingitaj vulkanoj, faras el ĝi kvazaŭ antikvan mezepokan vilaĝon, kun kutimoj kaj strangaj moroj el tiuj pasintaj jarcentoj. Ĉio estis malluma kaj silenta en tiu ĉi vilaĝo.

Sur la orienta flanko, kie la vidiĝo ŝajnas iom pli gajiga, kuŝas vastega lago kun verdaj senmovaj akvoj, kaj kies randoj estas borderitaj per altaj verdaj kreskaĵoj kaj malnovaj juniperoj.

Sendu HODIAŬ vian abonpagon per poŝtmandato (franca aŭ internacia).

Maldekstre de l'vilaĝo staras grandegaj kverkoj, juglandaj kaj kaŝtanaj arbaroj, etendiĝantaj ĝis la horizonto. Dekstre, tuj ĉe la eniro al vilaĝo, de kiu oni ekvidas multnombrajn senkulturajn kampojn; sidas tombejo, ĉirkaŭata de argila muro, en kies mezo elstaras granda fera nigra kruco. Vintre, tie ĉi okazas tre oftaj ventegoj aŭ neĝaj blovadoj, kiuj ŝajnigas tiujn ĉi regionojn pli mallaŭtaj kaj mallumaj.

Dum tiuj ĉi ventegoj, maljunulinoj rakontas, kaj eĉ certigas, ke eklumoj aperas ĉe la ĉefa monto de tiu montaro, alnomata de la vilaĝanoj : *La Satana sidejo*. Neniu vilaĝano ĝis nun, kuraĝis supreniri tiun monton, kaj, se iafoje devigite preterpasi la malsupron de la ensorĉita monto, tuj li faras grandan krucosignon, kaj rapide forkuradas por eviti la malbonan spiriton. Efektive, en tiuj preskaŭ sovaĝaj landetoj, la landanoj estas tre superstiĉemaj, kaj pri tio oni rakontas multajn legendojn, transdonitajn de patro al filo, kaj kiuj per tia transdoniĝo fariĝos por ili kredindaj okazintaĵoj. Do ni rakontos unu el tiuj terurigaj legendoj, kiu ĝis nun, oni ankoraŭ rakontas, al malbonaj infanoj, kiuj malŝatas la gepatrajn konsilojn.

Iom pli malproksime de la tombejo, sur la ĉefa placo vilaĝa, staras granda ŝtona konstruaĵo kun fera ĉirkaŭbaro; tio estas la vendejo en kiu, ĉiujn sabatojn kaj merkredojn oni vendas la produktitajn produktaĵojn de la ĉirkaŭaĵo kaj najbaraj vilaĝetoj. En tiu tago la vilaĝo reviviĝas, gajiĝas; la stratoj pleniĝas de granda popolamaso, kaj fariĝas pli bruantaj pro la ekkriado de la vendistoj, kondukistoj, kulturistoj kaj senokupaj buboj; en tiu bruado kunmiksiĝas la blekado de la alkondukitaj bestaroj por la provizado de la buĉistoj.

Tagmeze, post la finiĝo de tiu vendado, ĉio denove silentas kaj la apudaj kaj ĉirkaŭaj drinkejoj pleniĝas de soifantaj trinkantoj kaj precipe de ludantoj je ludkuboj. Nun regadas diboĉado kaj tie, pli ol unu trinkanto lasis sian pene akiritan posedaĵon, reenirante en malsobreca stato kun poŝoj malplenaj kaj vizaĝo malbonhumora.

Ian tagon, kiam ekvesperiĝis, la veturigisto Johano Gandolfo jam de longe staris antaŭ sia kaleŝo tute nove pentrita per

verdaj kaj ruĝaj koloroj. De tempo al tempo, li mnrmuris, atendente, sed vane, la maloftajn klientojn alveturantajn al najbaraj vilaĝoj.

El apudaj drinkejoj aŭdiĝis mokaj paroloj kaj bruado senĉese grandiganta de la multaj trinkantoj. Tio instigis lin partopreni al trinkado.

— Per la diablo, li ekmurmuris ; la klientoj fariĝos tre maloftaj, hodiaŭ vespere ; baldaŭ eknoktiĝos, kaj mi estos gajninta nenion por sensoifigi min...

Jen mi eksentas ekfalantajn pluvajn gutetojn... Estas okazo por trinki glason da vino... ŝajnos al mi, ke okazos baldaŭ ventego, ĉar la vetero estas sufokanta kaj mi sentas soifon. Mi ne povas plu stari...

Kaj lieniris la apudan drinkejon, plenan de granda nombro de ĉiuspecaj personoj. Enirinte kaj sidiĝinte ĉe larĝa tablo, apud kamena angulo, li petis de la drinkejmastrino, bela altkreska virino, kruĉon da blanka vino ; kaj kun malluma vizaĝo, ne atentante la apudestantojn li ektrinkis. Post mallonga tempo, li denove petis alian kruĉon da vino, ĝin trinkis kun grandiganta plezuro, kaj eltrinkinte kruĉon post kruĉo, li falis en la kamentan angulon, balbutante konfuzajn parolojn, ..

Johano Gandolfo estis vidvo, proksimume kvardekjara sed ŝajnis, ke li estas pli maljuna. Li portis, laŭ la vilaĝa kutimo bluan lankitelon, ruĝan ĉemizon kaj samkolovan zonon. Li estis piedvestita per dikaj najlitaj ŝuoj ; sur lia kapo maldece staris grasmakulita pinta felta ĉapelo. Lia bruna senforma kaj malsobra vizaĝo estis kovrita per haraj aknoj ; la okuloj estis ĉirkaŭnigraj kaj iom elstarantaj ; liaj longaj bukraj nigraj haroj, tie ĉi kaj tie elgriziĝis. Laŭ lia tuta eksteraĵo bone montriĝis la diboĉa vivo de tiu viro.

Kaj efektive, Johano, estis fama trinkulo ; de frua mateno ĝis malfrua nokto li trinkis ĉion, kion li gajnis per lia veturigista metio. Li senkulpiĝis pri tia farado, klarigante al demandemaj malnovaj amikoj, ke li nur serĉas ĝojon en fundo de malsobreco, por forpeli ĉagrenojn okazintajn antaŭ ne

Pro pagigo per poŝto aŭ banko, ni devas aldoni 0 fr. 50 al la abonprezo.

longe, kaj elĉerpi kuraĝon el sia malfeliĉo. Stranga senkulpiĝo de tiuj, kiuj sin fordonas al trinkado kaj diboĉado.

Tial, ĉiuj klientoj disiĝis de tia homo, pro malakceptiga eksterajo; kaj li, tion vidinte, ludis je ludkuboj ĉiuvespere kun ludantoj similaj al li.

Sed de kelka tempo, li ŝajnis malgaja ne tiel babilema kiel kutime, kaj ne partoprenis plu la ludadon de siaj kuntrinkantoj.

Tio ŝajnis tre stranga al ili, kutimintaj lin vidi ofte ludantan je ludkuboj senmanke.

Dum la hodiaŭa vespera ebriiĝado de Johano, sennombraj nigraj pensoj sulkigis lian frunton. La ĉeestantoj montris al si reciproke lian strangan sintenadon, lian malluman ŝajnon, kaj fine priparolis tian staton:

— Kiu estus kredinta tion? ekparolis la bela drinkejmastrino, sin direktante al juna belulo, kiu jam de longe admiris ŝin; kaj plenigante la glasojn de la trinkantoj, ŝi rediris:

— Jes, jam de longe lia konduto ŝajnas suspektinda; oni devus atenti pri lia nekonita konduto...

La juno belulo okupita ŝin rigardi, respondis pravigante ŝin, kaj samtempe pliigante ŝian diron.

— Jes sinjorino Marieto, li ekkriis, oni devus esti singardema kontraŭ tia homo; oni ne scias kien li iras, el kie li venas ĉiunokte; tio estas tre stranga afero, kaj mi ne dezirus lin renkonti ĉe ia enarbara vojturno...

— Tre vere estas tio, kriis unu voĉo.

— Mi konis lin tre sobra autaŭe, rediris la belulo; kaj nenio en la mondo estus deviginta lin trinki, precipe en tiu sama tempo, li tre malŝatis la kunestadon de trinkantoj; sed nun...

— Vi ne bezonas tiom paroli, kiom vi faras, diris alia voĉo, vi estas tia, kia ĝi estas...

La belulo ekkoleris, kaj autaŭe eltrinkinte sian glason respondis akre...

— Kaj vi Adolfo, ĉiama drinkeja ĉeestanto; vi ekvidas pajlon en la okulo de najbaro, kaj la grandegan trabon, kiun vi havas en via unika okulo estas nevidebla por vi, maltaŭga unuokululo!... malspritulo!

La 4-a jaro komenciĝis en oktobro; ĉu vi abonis de oktobro?

La insultita unuokululo ne respondis.

-- Nu, nu, miaj karaj amikoj, parolis la drinkejmastrino, ne intermalpacigu. Ja, vi ŝajnas al mi, hodiaŭ vespere, malbonhumora kaj ofendsentema; nu kvietigu... ne ofendu miajn bonajn klientojn... sed aŭskultu la maljunan kampogardiston. Li saĝe parolas, li estu ekzemplo por vi!

Ĉiuj silentis.

— De la tempo, kiam mi konatiĝis kun Johano, parolis la kampogardisto, li estis luanto de lia nuna kaleŝo, kaj ĉiuj lin eŝtimis kaj respektis; bonan klientaron li posedis en la tuta vilaĝo kaj ekster la vilaĝo. Jen, ho ve, de kiam li fariĝis pседanto, la afero sanĝiĝas; pli kaj pli lia mon-avideco kaj komenciĝanta malsobereco vidiĝis. Jes, li ĵetis sin en grandan malsobrecon, sekve de ĉagrenoj nekonataj de ni, ĉar, kiel vi ĉiuj scias, li estas tre malciigema. Baldaŭ li malriĉiĝis fortrinkiote ĉion, kion li posedis, kaj eĉ, samtempe, la laŭmezure gajnitan monon.

Ĉu tio ne estas stranga, devas esti io alia, laŭ mia opinio; eble teruriga sekreto estas en tio ĉi. Nun, mi sufiĉe parolis, nenion plu...

Ĉu vi deziras alian kruĉon da bona maljuna vino, antaŭ ol foriri? demandis la drinkejmastrino, kiu neniam preterlasis la okazon vendi sian komerĉaĵon, kaj samtempe uzis sian belecon, tre influantan sur ŝiaj klientoj kaj amindumantoj kiuj ĉiuj interdisputis la rajton esti sur la unua vico.

— Komprenele, la juna belulo, kiu intencis fariĝi kiel eble plej afabla kaj aminda kontraŭ ŝi ne malakceptis ŝian proponon kaj alportigis novajn kruĉojn da vino; same, kiel li, faris la aliaj ĉeestantoj.

La juna belulo tiom trinkis kaj paroladis pri diboĉado, ke li mem ebriiĝis kaj falis sub la tablon, ridigante siajn kontraŭdirantojn.

Jam noktiĝis, kiam post granda trinkado kaj bruado, la trinkantoj ŝanceliĝantaj disiĝis kaj forlasis la drinkejon, ne atentinte pri ambaŭkuŝantaj drinkuloj. La drinkejmastrino ekkalkulis siajn tagan kaj vesperan enspezojn, kun kontenta vizaĝo.

Mi hontas diri, ke kelkaj ne ankoraŭ pagis por la 3-a jaro.

Ekstere, tra la vitroj de l'fenestroj, lumigitaj de konsumi-
 ĝantaj torĉoj, vidiĝis sur la vendoplaco, la kompatinda ĉevalo
 de Johano, kiu dum atendado de sia mastro, staris rezigne kun
 malstarantaj lacaj kruroj kaj mallevitaj oreloj.

Subite, la vento ekblovas kaj fariĝas ventego. Post kelka
 tempo, longaj polvturniĝoj altiĝas super la placo aeren kaj
 faladas en la okulojn de la kompatinda kaj pacienca besto.

Ektondras; grandaj nuboj amasiĝas super la pintoj elsta-
 rantaj de la ĉirkaŭantaj montoj kaj longaj fajraj fulmoj eliĝas
 de tempo al tempo el ili, lumigitaj la tutan ĉirkaŭaĵon kaj
 vilaĝon.

Timigaj tondroj sonadas en la apudaj arbaroj, sur la kam-
 pojn, sur la lago kaj vilaĝo. Pluvaj riveroj faladas de la ĉielo,
 sin ĵetegante laŭlonge de la krutaj flankoj de la montoj, enve-
 nas la vilaĝon, kiu baldaŭ fariĝas vera marĉa maro.

Furiozaj aeraj ondoj falas sur la senmovan lagon; ili tiel
 forte premeblas tiun ĉi, ke la ondoj kvazaŭ ebeniĝas; sed, ribe-
 lante sin, la lago kovras sin per grandegaj sulkoj kaj ondoj, sku-
 ataj ĝisfunde, saltas trans la bordojn, kaj altiĝas supren, por
 refaladi sur la bordojn kun surdiga bruego. La lagaj bordoj mal-
 aperas kovritaj de saŭmantaj ondegoj; la bordaj kreskaĵoj de
 l'lago kliniĝas, kiel herboj malfortigitaj kaj kuŝas plate
 premigitaj de forpuŝantaj ondegoj. La vento forbalaas ĉion,
 kio kontraŭstara al ĝi; tamen, oni eksertas malfortiĝon
 de la ventego, tial, ke baldaŭ ĝi fariĝas ne longdaŭra.

Efektive, la ventego nur daŭris du horojn. Ĝi trankviliĝas;
 iom post iom, la luno leviĝas, kaj dolĉe ekreĵetas siajn radiojn,
 sur la vilaĝon. Venteto malforta trakuras la arbarojn kaj ek-
 movigas karese la akvojn de l'lago kvietigita. El ĉiuj flankoj
 eksonas mallaŭta brueto, kiel okazas ofte post ventego, kaj tran-
 kvile la nokto disvolviĝas...

Eksonas blasfemoj... Johano vekigatas... Ne salutinte la drin-
 kejmastrinon, li eliras el la drinkejo, kaj sin direktas al la placo
 murmurante.

— Ne, tio ne povas daŭri senfine... Estas neeble gajni mo-

**Memoru bone, ke ĉiu abono estas pagota antaŭe, NE FINE
 de jarabono.**

non... Mi devas forlasi tian malbenitan landon... Mi ne povas elporti plu... Estas necese, ke ĉio finiĝas... Mi devas ŝanĝi mian farmanieron... Mi faros denove tion, kion mi jam Li haltis kaj silentis, ĉirkaŭriganta suspekteme.

Le ĉevalo ekblekis. Johanis ekkoleras, kaj preninte skurgbastonon en la veturilo ekfrapas la kompatindan kreitaĵon. Li tiel frapis, ke la skurgbastono fariĝas sangoplena kaj vidiĝas longaj sangaj strioj sur la korpo de la ĉevalo. Ĉe ia ekbato fortega, la besto eksaltas kaj glitas je la kvar piedoj sur la kota pavimo.

Dume, nigra vireto portanta pezan pakajon, similantan al granda leda sako, rigardas, kun mokrideto, Johanon frapantan la senkulpan ĉevalon. Tiu-ĉi ekvidinte la nigran vireton, kaptas la okazon, por disputi iun, kaj tiamaniere, helpi sian koleron.

— He vi, kiu staras tie, li diris kun raŭka voĉo, — kion vi atendas ĉi tie? Ĉu vi atendas ke mia kaleŝo estu preta por vin veturigi.

Ĉu vi deziras veturadi?

La nigra vireto respondis:

— Kial ne!

— Ĉu vi mokas min! reiris kolere Johano; vi malbone opinias pri mi!

Ne estas momento por veturadi, post tia pasinta ventego; preterpasu, kaj lasu min, se vi ne volas ricevi batojn kiel memoraĵon. Kajdirinte tiujn vortojn, li minace aliris la nigran vireton.

(*Sekvo venos*).

Luis CARLOS.

ŜAKOJ

(Sub la redakcio de John Ellis, el Keighley, Anglujo.)


LECIONO IX.

La germana sistemo por noti la irojn estas sciinda de Esperantistoj ŝakludantaj; ĝi estas simpla kaj malpli erarigema ol

Multaj abonoj komencas en januaro; vidu la daton de via abono.

aliaj sistemoj, sed pro ĝia abstrakteco ne prezentas al la cerbo sufiĉe klaran bildon de la ludo. La fundamenta principo de tiu sistemo estas, nomi ĉiun linion, de maldekstre dekstren, laŭ la unuaj literoj de l'alfabeto, rigardante la tabulon de la flanko de Blanko. Tiel ĉiu kvadrato havas difinititajn literon kaj numeron, kiuj ne ŝanĝiĝas. La kvadratoj, kie staras la turoj je la komenciĝo de ludo, estas ĉiam a1, h1, a8 h8. Bonega sistemo ! sed kiu post 40 iroj povos memori, kia peco staras, ekzemple, sur e5 ? Pro tio la sistemo forlasas sian simplecon, kaj kiam peco krom soldato iras, oni montras tion per la aldono de la komenclitero de la iranta peco. Oni uzas ankaŭ la signojn : x por montri kapton, + por ŝak, kaj X por ŝakmortigo Jen amuza ekzemplo de la sistemo,

LA HEROO DE KOEPENINK ŜAKFIGURATA



En la figuraĵo la blanka Reĝo riprezentas Fikapitanon Voigt. Li sin prezentas antaŭ la urbestro de Koepenink (la nigra Reĝo sur a1). Per subita movo.

1. R C3 x T d2 +

li prenas posedon de la kaso (T d2), kaj samtempe malkaŝas sian ŝerĝonton (K h8). Li diras al la urbestro, ke li havas pluajn soldatojn kaj ordonas lin, iri Berlinon.

La turo sur a7 riprezentas Berlinon. La urbestro vane protestas, sed iras,

1. a1 — a2,

ĉar lia malsprita policano (la kuriero sur b1) malhelpas, ke li iru laŭ alia direkto. La Fikapitano krias « Rapidu », kaj por rapidigi la mirigatan urbestron, li plialtrangigas unu el siaj soldatoj, farante el li ŝerĝonton. Fortikigate de la aliĝo de tiu

La Direktoro bezonas monon, ĉar la presisto, la kompostistoj, ktp. bezonas monon

ĉi suboficiro, la dua serĝento (K g8) piketas la malleliĉan urbestron per sia glaveto. Tion ĉi oni riprezentas per

2. f7 — f8 — K +

La urbestro antaŭeniras devige laŭlonge de la linio, kaj la senkompata fikapitano, ankoraŭ retenante sian kaptitaĵon, donas la sekvantajn ordenojn

3. e7 — e8 K +

4. d7 — d8 K +

5. c7 — c8 K +

Nun la fikapitano aliigas sian planon, estante malp oksime de la sceno. Li ordonas, ke la lasta soldato fariĝu ĉevaloficiro, kiu fine metas la longesuferantan urbestron en malliberejon.

La glora ŝuista pseŭdo-kapitano finas la aferon per

6. b7 — b8 Ĉ ×.

Solvo de Problemo 9-a: La antaŭlasta iro de Blanko estis : 1 S (sur 4 R) — 5 R (Ŝak malŝirmante). Nig respondas : 1.....S (sur 2 K R) — 4 KR; 2 S × S (pasante) kaj Ŝakmort.

Ĝuste solvis: S-o Kapitano Reynier, ano de la SOCIETO DE ESPERANTISTAJ ŜAKLUDISTOJ.

PENSOJ

— Moroj aliĝas per la riĉeco, ecaro per la laŭdoj, opinioj per la libroj kaj principoj per la tempoj.

— La homo estas de tiel eminenta deveno, rango, distingo indeco kaj destino, ke li povas edziĝi kun la ĉielfilino « Virto ».

— Ofte al la homoj nenio estas pli profita ol memestimemo, kiu, fundamentita sur prudento kaj rajto, estas bone direktata.

— La plezuroj incitas la kordezirojn, sed ne satigas ; ili ne kontentigas la animon, sed nur malkvietigas.

— Ofte nur la rememoro nin atentigas je la feliĉo kiun ni ĝuadis.

— Bela morto nobeligas la tutan vivon.

— Ĉiu homo bezonas kredon pro kiu la vivo al li vivinda kaj la morto mortinda ŝajnas.

Neniu estas pli ol homo, sed multaj estas malpli.

Esperantigis CH. ZACHERL.

Sendu HODIAŬ vian abonpagon per poŝtmandato (franca aŭ internacia).

ANNALES DE PHILOSOPHIE CHRÉTIENNE (*Analoj de filozofio Kristana*). — Direktoro Pastro Laberthonnière. Administracio Librejo Bloud, 4, rue Madame, Paris; abono jara: 20 fr. — 100 paĝoj monate. — La plej internacia, plej serioza, plej progresema revuo filozofia!

REVUE DU CLERGÉ FRANÇAIS (*Revuo de Franca Pastraro*). — Redaktoro: Pastro J. Bricout, 17, rue Fénelon. Administracio: Librejo Letouzey et Ané, 76 bis, rue des Saints-Pères, Paris. Jarabono: 23 fr. (En Franci. 20 fr.) 110 paĝoj duonmonate. Revuo tre progresema pri studoj pastraj. En ĝi kunlaboras la plej kleraj pastroj francaj.

JUNA ESPERANTISTO, monata gazeto por Junuloj, instruistoj, eklernantoj, abono: 2 fr. 50. — Ĉe Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris. — Specimeno senpage.

➤ LE SOUVENIR, Monato Ĵurnalo literatura. — BELGUJO: 1 frank. — Unuiĝo poŝta 1 fr. 50 — Direktoro-Fondatoro: XAVIER CASIER, Premiita de Akademio Reĝa de Bel-Artoj, membro de komitato de Unuiĝo de perioda Gazetistaro ».

KOLEKTISTOJ: S-o, VARJU Endre, Budapest, IV, Kygio U-E 62, em, 11, kolektas k. interŝang. uzitajn poŝtm.

INSTITUTO DE MODERNAJ LINGVOJ

ANGLA, FRANCA, GERMANA, INTERNACIA

La Sinjoroj dezirantaj ellerni unu el la supraj lingvoj estas petataj sribi por pluaj sciigoj al la Direktoro:

S-o J. A. THILL, BARTON CRESCENT, PLYMOUTH, ANGLUJO
NE PLI OL KVAR LERNANTOJ ESTOS

AKCEPTAJAJ SAMTEMPE

(10-3)

PENSIO POR GESINJOROJ: GENEVO. — S-ino RISER, 4, rue de Candolle. — Moderaj prezoj. Hejma vivado. Oni parolas en Esperanto.

S-o PAULO KEILICH. COELN-LINDENTHAL, gleüelerstrass 135, (Germanujo), deziras korespondadi per ilustritaj poŝtkartoj ĉiam respondas.

S-o PAULO KEILICH, COELN-LINDENTHAL, gleüelerstrasse 135, (Germanujo), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Li sendo poŝtmarkojn germanajn. (3-

LES LANGUES VIVANTES (*La Vivaj Lingvoj*) Angla, Germana, Itala, Hispana, Franca, kaj Esperanta. Ilustrita Revuo duonmonata. — Publikigas kurson pri Esperanto de P^o Em. Peltier.

Abonoj:	PLENA REVUO	3 LINGVOJ	2 LINGVOJ	1 LINGVO
Francl.	7 fr. 50	6 fr.	4 fr. 50	3 fr.
Eskter Fr.	9 fr. 50	7 fr.	5 fr. 50	4 fr.

Oni abonas ĉe la Direktoro de E. K.

LA REVUO — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^o ZAMENHOF. — Ce Hachette k. K^o Paris. — Jare, Francujo : Fr. 6 ; ceteraj landoj Fr. 7.

LINGVO INTERNACIA, centra organo de la Esperantistoj, la plej malnova gazeto (1895), eliras nun la 15-an de ĉiu monato. Abono : 5 fr. — Kun Literatura Aldono : 7 fr. 50. Specimeno senpage. — Presa Esper. Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

ESPERO PACIFISTA, MONATA ORGANO DE LA SOCIETO POR LA PACO, abono 5 fr. kun aliĝo al la Societo kaj ricevo de la aldonoj.

S-ro Gaston Moch, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

« **TRA LA MONDO** » (*Tutmonda multilustrata revuo esperanta*). — Nuntempaĵoj ; arto, literaturo, sciencoj ; komerco, industrio ; militistaro, maristaro ; teatro ; sportoj ; virina kaj gejunula paĝo ; felietono ; ludoj, konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Jare : 8 fr. kvaronjare : 2 fr. 25. — Turnu vin : 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-M.), France, aŭ al la Direktoro de E. K.

Abono sen pluaĵ elspesoj en francaj poŝtoŝejoj.

Pri unu speco de kurbaĵ linioj, koncernantaj la V-an Eŭklidan postulaton. Verkis Profesoro A. DOMBROVSKI (2-a eldon.) 0 fr. 65

Pri novaj trigonometriaĵ sistemoj. Originale verkis Prof. A. DOMBROVSKI..... 1 fr. 80

(Aĉeteblaj *po-grande* nur ĉe la Direktoro de E. K.)

PREĜARO (*en preparo*). Tri kajeroj, kies unua nun

ekpresigas..... 3 fr. 30

Unua kajero..... 1 fr. 10

EN PRESADO : *Helrea Kalendaro*, 16-paĝ. broŝuro, de Pastro Jakobo BIANCHINI,..... 0 fr. 20